

**L**★**Umo** 

ISSN: 0827-3154

**ENHAVO LIMDATO  
SKIZA POR LA VENONTA  
NUMERO**


**Kanadaj novaĵoj 2**

**La 15a de februaro 2018**

**Raportoj kaj kontribuaĵoj 11**

**[lumo.revuo@gmail.com](mailto:lumo.revuo@gmail.com)**

**Diversaĵoj 32**



**Lumo estas la revuo de  
la Kanada Esperanto-Asocio.  
Por membriĝi en KEA,  
vizitu nian retejon.**

## **DETALA ENHAVO DE LA NUMERO**

Redaktorina rubriko .....	1
<b>KANADAJ NOVAĴOJ .....</b>	<b>2</b>
Nekrologa rubriko .....	2
- Forpaso de Erna Shepard .....	2
- Forpaso de Saĉjko Iŝtok .....	5
E-aranĝoj en Kebekurbo .....	7
Ne ekzistas malgranda lingvo .....	8
Bondeziroj, el la Lumo-teamo .....	10
<b>RAPORTOJ KAJ KONTRIBUAĴOJ .....</b>	<b>11</b>
NOREK 2017 .....	11
ARE 2017 .....	15
La alfabetoj interrilataj .....	19
Danci la vivon .....	25
Skizaj memoroj de Marjorie Boulton .....	27
<b>DIVERSAĴOJ .....</b>	<b>32</b>
Reklamo: Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado .....	32
Reklamoj de la Kastelo Greziljono .....	33
Informletero de Vinilkosmo .....	35
Krucvortenigmo .....	36
Kontribuantoj .....	37

# Redaktorina rubriko

**K**araj legantoj,  
Ni komencas tiun freŝan numeron per nekrologa rubriko kaj tristaj novaĵoj: la esperantistinoj Erna Sheppard kaj Saĉjko Iŝtok forpasis. Wally du Temple verkis omaĝon al Erna Sheppard, kaj Jed Meltzer faris same por Saĉjko Iŝtok. La Esperantujo de Kanado perdis du grandajn membrojn kiuj ŝatis poezion, kaj ni nepre sentos la mankon de kontribuadoj de Saĉjko Iŝtok en venontaj numeroj de Lumo.

Aliteme, ĉu vi scias ke la Esperanto-Societo Kebekia starigis ĉiu-monatajn E-renkontiĝojn en Kebekurbo? Lernu pri tiu bona iniciato de Suzano Roy. En "Ne ekzistas malgranda lingvo", Bob Williamson prezentas raporton pri prelegoj koncerne Esperanton kaj la judan popolon, kiuj okazis en novembro en Halifakso. Sekvas raportoj pri NOREK 2017 kaj ARE 2017, verkitaj respektive de Ardeo Mann kaj Kamila. Yury

Jakymec proponas denove klerigan tekston pri interrilataj alfabetoj, kaj Tamara-Ne-Amara enkondukas la koncepton de la Biodanco. Geoffrey Greatrex dividas kortuŝan verkon pri siaj skizaj memoroj pri Marjorie Boulton.

La numero enhavas multajn reklamojn. Unue, oni povas mendi libron de *Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado*. Sekve, la Kastelo Greziljono prezentas sian programon por 2018 kaj havas peton por mona subteno de handikapula dormoĉambro. Fine, ĉar ĝojo devenas el muziko, jen la informletero de Vinilkosmo. Krucvortenigmo de Trevor Brown atendas vin ĉe la fino de la revuo, kaj la teamo de Lumo dankas vin por la jaro 2017; ni troviĝos en 2018!

Bondezirojn por la ferioj,

**Kamila**

[Camille-Amélie Koziej Lévesque]

**Redaktorino**



# KANADAJ NOVAĴOJ

## Nekrologa rubriko

**Erna Sheppard  
(1922-2017)**

Verkita de Wally DuTemple

Erna naskiĝis en la komunumo de Worpswede, konata kiel vilaĝo de artistoj, en Germanio la 30an de junio 1922. Pro tio ke Erna naskiĝis post la fino de la Unua Monda Milito kaj vivis en Germanio dum la daŭro de la Dua Monda Milito estiĝis en ŝia karaktero forta sento de stoikismo kaj emo al sendependeco kiu restis kun ŝi dum la daŭro de ŝia vivo. Erna deziris esti libera, libera de kondiĉoj kaj de la homaj malbonecoj kiuj kaŭzas militojn. Ŝi sentis en si emon por aventuroj. Ŝi akiris la konvinkon ke individuoj povas forte kontribui por montri ke ĉiuj homoj estas egaluloj laŭ homaj rajtoj, ke la homaro estas unu familio. Pro tiu kredo, Erna subtenis la Internacian Lingvon Esperanto, kaj aliajn pacigajn movadojn.

Erna elmigris de Germanio al Kanado per la marŝipo "Fairsea", kaj albordiĝis ĉe kajo 21 en Halifakso, Nova Skotio en la jaro 1951. Poste, ŝi transloĝiĝis al Toronto por mallonga periodo. De Toronto ŝi vojaĝis per aŭto okcidenten al Brita Kolumbio. Ŝi enamiĝis al la beleco de la naturmedio de Kanado, al ĝiaj vasteco, stepoj, montoj, lagoj. Kiam ŝi atingis la pacifikan provincon de Brita Kolumbio, ŝi sentis la atingon de nova hejmo. Ŝi loĝis en diversaj vilaĝoj laŭlonge de la marbordo, edziniĝis, divorcis, kaj edukis kaj nutris tri infanojn per sia forta amo, tamen respektis la individuecon de ĉiu el ili.

Erna neniam perdis la emon aventuri. Ŝi biciklis ĉien en tempo kiam homoj eĉ ne elpensis specialajn vojetojn por bicikloj. En la aĝoj de 50 ĝis 70 ŝi kajakis ĉiusemajne, naĝis, kaj velis per surftabulo. Ĉiujare, ŝi vojaĝis internacie por subteni Esperanton, kaj por viziti la mondon pere de ĝi. Ŝi daŭre subtenis movadojn pri virinaj rajtoj kaj pri homaj rajtoj ĝenerale. Pro tio ke ŝi perdis fraton en la koncentrejoj de Germanio, ŝi kampanjis por paco, por interkompreniĝo de la homaro. Ŝi estis kompleksa kaj ne konvencia virino kiu neniam perdis la fidon ke individuo povas fari pozitivan kontribuon al monda progreso.

Erna fondis klubon de Esperanto en Nanajmo (Nanaimo), urbo ĉe la mez-orienta flanko de insulo Vankuvero. La urbestro tie ĉiujare hisis la verdan flagon de Esperanto ĉe la urbodomo kaj faris proklamacion favore al la 'Semajno de Internacia Amikeco' kiun tiutempe forte disvastigis UEA. Dum la 69a Universala Kongreso de Esperanto en Vankuvero, Erna organizis kaj gvidis la 'Infanan Kongreseton' por ke profitu de la UK la infanoj de parolantoj de Esperanto, inkluzive de denaskaj parolantoj de tiu lingvo.

En 1981, Erna helpis fondi la jaran renkontiĝon de geesperantistoj kies nomo estas NOREK – la Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco. En 2017, NOREK ankoraŭ funkcias. Membroj de NOREK sendube memoros multajn elstarajn kontribuojn de Erna al la artaj programoj. Erna deklamis poemojn, fabelojn, kantis bele kaj partoprenis en popoldancado kiel knabino kiam ŝi estis jam pensiulino.

Erna aĉetis sian propran terenon en la komunumo de 'Powel River', Brita Kolumbio, kaj vivis tie ĝis ŝi aĝis 92. Poste, ŝi transloĝiĝis al Sidney, Brita Kolumbio, por esti proksima de sia filino, Helga, kaj bofilo, Joe. Ŝi loĝis proksime al sia amata maro al kiu ŝi povis ĉiutage promeni. Ŝi mortis pace la 24an de septembro 2017 tuŝapude al la familia rondo.

*Der Lindenbaum*

Am Brunnen vor dem Tore  
Da steht ein Lindenbaum  
Ich träumt in seinem Schatten  
So manchen süßen Traum  
Ich schnitt in seine Rinde  
so manches liebes Wort  
Es zog in Freud und Leide  
|: Zu ihm mich immer fort :|

Ich muß auch heute wandern  
Vorbei in tiefer Nacht  
Da hab ich noch im Dunkel  
Die Augen zugemacht  
Und seine Zweige rauschten  
Als riefen sie mir zu:  
"Komm her zu mir, Geselle  
|: Hier findest du deine Ruh :|

Die kalten Winde bliesen  
Mir grad ins Angesicht  
Der Hut flog mir vom Kopfe  
Ich wendete mich nicht  
Nun bin ich manche Stunde  
Entfernt von diesem Ort  
Und immer hör ich's rauschen:  
|: "Du fändest Ruhe dort :|

*Wilhelm Müller, 1822 (1794-  
1827)*

**Beside the Village Fountain**

**(Am Brunnen vor dem Tore)**

Beside the village fountain  
There grows a linden tree,  
Its shady branches fostered  
Fond childhood memories.  
Its bark bears the engravings  
Of youth and of romance-  
Its windvoice seems to whisper:  
"Come back when you get a  
chance!"

My travels took me past it  
The night was cold and stark.  
I felt forlorn and lonely  
And closed my eyes in the dark.  
The windvoice in its branches  
Kept calling after me:  
"Come stay with us, dear fellow  
You'll find tranquility."

The icy winds were blowing  
Directly in my face  
My hat went with a windgust  
I did not slow my pace.  
No matter where I wander  
The windvoice calls to me:  
"Come home to your own village  
To fountain and linden tree."

Translated by Erna Sheppard

**Tilio**

Tilio granda Kreskas  
Ĉe la puto de l'vilaĝ'  
En ĝia ombro ofte  
Mi revis en junag'.  
Gravuris en la ŝelon  
Vortojn de arda am',  
En ĝojo kaj tristeco  
Ĝi logas min ---ĉiam!

Mi devas prêter vagi  
En nigra nokto ĉi,  
Soleca en mallumo-  
Okulojn fermis mi.  
Kaj dolĉe al mi flustris  
La branĉoj de l'tili':  
"Venu al ni migranto  
Trankvilon trovos vi!"

La frosta vento ŝovis  
Fortege kontraŭ mi.  
Ĉapelon ĝi forblovis  
Ne kapon turnis mi.  
Nun multajn horojn estas  
Mi for de tiu lok' -  
Sed ĉiam min relogas  
Eterna, tilia vok'!

Translated by Erna Sheppard

# Nekrologa rubriko

## **Sachiko Momoki Istok**

### **(1938-2017)**

Verkita de Jed Meltzer



Naskiĝis la 22an de Marto, 1938,  
mortis la 19an de Oktobro, 2017.

En Esperantistaj rondoj ŝi ofte skribis sian nomon "Saĉjko ISTOK", sed mi uzos ĉi tie la nomon, kiun ŝi uzis ĉe Fejsbuko. Sachiko estis longdaŭra loĝanto en Niagara Falls, Ontario, kaj aktiva membro de la Kanada Esperanto-Asocio. Ŝi naskiĝis en Japanio, en la provinco Akita, la sesa el ok gefratoj. Kune kun sia pli juna fratino Mitsuko ITABASHI, ŝi eklernis Esperanton je juna aĝo kaj ĝuis korespondadon kun samideanoj tra la mondo, inkluzive sian estontan edzon, Joe-on ISTOK, esperantiston naskiĝintan en Jugoslavio. Ŝi estis liberpensulo en konservativa post-milita Japanio, kaj revis esplori la mondon. En 1966, ŝi ĉeestis la UK-on en Budapeŝto, kaj poste partoprenis organizitan rondiron en Eŭropo kun Japana Esperantista grupo. Por tiu ĉi vojaĝo, ŝi havis sufiĉan monon nur por unudirekta flugbileto, sed ŝi decidis iri ĉiuokaze kaj trovi la sekvan paŝon poste. Ŝi trovis laboron en hospitalo en Svislando, loĝante kun Esperantista paro, kaj tie renkontis Joe-on vizaĝ-al-vizaĝe la unuan fojon. En 1968, la paro migris al Kanado, kaj geedziĝis en Toronta preĝejo dum la unua tago en la lando. Tie ili naskis tri infanojn, kaj loĝis kune ĝis la morto de Joe en 2005.

Migrinte al Kanado, Sachiko kultivis profundan intereson pri la historio de sia adoptita hejmlando. Ŝi laboris kiel profesia ĉiĉerono, aparte por Japanaj vizitantoj en la regiono de Niagara. Ŝi estis naturamanto, entuziasmo pri sovaĝaj floroj, kaj serioza amatora fotisto. Ŝi ofte kudris siajn proprajn vestaĵojn kaj pupojn, kaj talente praktikis vid-artojn kiel pentrado kaj ink-desegnado. Ŝi daŭre korespondis Esperante, kaj ofte ĉeestis regionajn eventojn en Ontario kaj Kebekio. Ŝi restis aktuala en siaj intereso, kaj lernis fasoni retejojn je matura aĝo, fariĝante la retestro de la Natur-Socio de Niagara Falls, kaj verkante plurajn blogojn en diversaj lingvoj (vidu ligilojn sube). Plej lastatempe, en sia oka jardeko, ŝi komencis lerni la tradician japanan muzikilon *tajŝogoto*, kaj forte aktivis en la kampanjo por helpi la viktimojn de la tertremo en Fukushima de 2011.

Sachiko postlasas du filinojn, nomatajn Csilla-Sakura kaj Tünde-Shinobu ISTOK, kaj filon, nomatan Taro-Csongor ISTOK, du genepojn, kaj kvin gefratojn. Sachiko ĝuis proksiman rilaton kun sia esperantista fratino Mitsuko dum la jardekoj post sia elmigro, kaj ambaŭ renkontiĝis ofte ĉe Esperanto-kongresoj ĉirkaŭ la mondo.



bildoj kun poemoj en Esperanto:  
[pepci.blog.so-net.ne.jp/](http://pepci.blog.so-net.ne.jp/)

En la japana kaj Esperanto  
[blog.goo.ne.jp/verdavojeto](http://blog.goo.ne.jp/verdavojeto)

Rakontoj en Esperanto:  
[verdavojeto.wixsite.com/miaj-fabeloj](http://verdavojeto.wixsite.com/miaj-fabeloj)



//////////////////////////////////// E-aranĝoj en Kebekurbo

La Esperanto-Societo Kebekia anoncis ekde oktobro sur ĝia [Facebook-paĝo](#) novajn Esperanto-aranĝojn en Kebekurbo. Proprainiciate, Suzanne («Suzano») Roy gvidas praktikadon de la lingvo per diversaj ekzercoj, rolludoj, ktp. La celgrupo estas progresantoj. Tio okazas ĉe Café Krieghoff, 1089 Avenue Cartier, Kebekurbo. Suzano celas okazigi tiun renkontiĝon la antaŭlastan vendredon de ĉiu monato.



**17a horo kaj 30:** praktiko kaj antaŭmanĝo  
**19a horo:** diskuto pri/en Esperanto





## Ne ekzistas malgranda lingvo | Bob Williamson

La 28an kaj 29an de novembro en Halifakso okazis serio de du (anglalingvaj) prelegoj titolita 'La Lingvo Esperanto: Modernaj Revoj kaj Juda Utopio.' La preleganto, Sebastian Schulman el Usono, estas provizora direktoro de KlezKanada (Montrealo), erudiciulo pri la jida, rusa kaj esperanta lingvoj, kaj studas la judan historion de Moldavio (ĉe Universitato Indiana, Bloomington, Usono). Li ankaŭ agadas kiel traduka redaktoro por «In geveb», gazeto de Jidaj Studoj ([ingeveb.org](http://ingeveb.org)). Printempon 2018 li planas translokiĝi de Masaĉuseco al Montrealo. Parenteze, li ankaŭ estas lerta dancisto, kiel li rapide kaj bonhumore montris.

En la unua prelego, li skizis la motivojn de L.L. Zamenhof (1859-1917) por krei la lingvon kiun hodiaŭ ni konas kiel Esperanton. Li donis bazajn faktojn kaj gramatikon por ne-esperantistoj, kaj montris kiel Zamenhof unue pripensis utilan lingvan komunikilon ĉefe por la juda popolo. En tiu epoko akre konkuris diversaj malsamaj opinioj pri la plej bona lingvo por judoj, de la popola jida ĝis la hebrea, lingvo de la Biblio.

Pro diversaj kialoj, la ideoj de Zamenhof evoluis de juda lingvo al la Internacia Lingvo, de filozofio pri Interna Ideo tra Hilelismo ĝis Homaranismo. Poste, Sebastian respondis kelkajn demandojn kaj komentojn de la malgranda ĉeestantaro.

En sia dua prelego, beletra tradukisto Sebastian Schulman prezentis kelkajn el siaj tradukoj anglalingven de jidaj kaj esperantlingvaj verkistoj. Inter tiuj estis la ĉi-jare eldonita *Croatian War Nocturnal* (Phoneme Media, Los Angeles, 2017), traduko de la libro *Kroata Milita Noktlibro* (Pro Esperanto, Vieno, 1993) de Spomenka Štimec. La tradukita verko bonege spegulas la originalon, kaj li legis la tradukon de sia plej ŝatata ĉapitro, «Majo en Sarajevo». Eĉ post 34 jaroj, la pensiga potenco de la verko trafas la nuntempan mondon. Oni povas nur esperi, ke la mesaĝo pri paco en tiu libro tuŝos multe pli vastan legantaron. Sebastian prezentis ankaŭ aliajn el siaj interesaj tradukoj de verkistoj kiel Boris Sandler kaj Yekhiel Shraybman. Li traktis la arton traduki, kaj citis la opinion ke tradukisto povas nur verki poemon pri la originala poemo. Saĝaj vortoj de iu, kiu bone konas sian temon. Bedaŭrinde pro tiamaj universitataj ekzamenoj kaj magra reklamado, la ĉeestantaro konsistis ĉefe nur el la loka esperantistaro.

Dume, la montreala esperantistaro baldaŭ havos novan kleran kaj lertan kunlaboranton.



# BONDEZIROJ EL LA LUMO-TEAMO

## **Nova kresko de Lumo:**

- Ĉirkaŭ 150 legantoj
- 4 elsendoj ĉiujare
- Teamo de provlegantoj por bona lingva kvalito
- Reklamoj kaj numeroj kun propra grafika stilo

Zamenhofa festo, ferioj,  
kaj Nova Jaro:  
**tiom da kialoj por festi!**

La teamo de Lumo sendas al vi elkorajn bondeziroj kaj dankas vin por viaj multaj kontribuajoj kaj bonaj komentoj; tio plibonigas la revuon. Nun estas la tempo de bilanco. La revuo ne estas perfekta kaj ĉiam estas en progreso; kio mankas laŭ vi? Ne hezitu proponi bonajn ideojn por la plibonigo de la revuo, kaj nepre, daŭre sendu kontribuajojn de ĉiaj tipoj!

La zamenhofa festo estas bona okazo por kontribui: verku por la venonta numero artikolon rakontantan kiel vi festis en via loka grupo.

Limdato: 15a de februaro 2018.

# RAPORTOJ KAJ KONTRIBUAĴOJ

## NOREK 2017

Ardeo Mann

Estis ĵaŭdo posttagmeze en septembro kaj mi trinkis teon kun amiko en Viktorio. Post iom da tempo, mi kontrolis mian poŝtelefonon kaj malfermis la aplikaĵon Amikumu. Esperantistoj jam aperis en la urbo, nur du kilometrojn for de mia loko.

Jam estis mia kvina NOREK (Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco), sed, ĉi tiu konferenco estis sufiĉe malsimila sperto por mi. Estis la unua fojo kiam mi kunorganizis Esperantan kongreson. Estis la unua uzo por la spertoj kiujn mi akiris dum somero en Eŭropo. Kaj estis la unua NOREK kiam mi ne estis la plej juna esperantisto tie.

La kongreso komenciĝis vendredon vespere per ludoj, manĝaĵo kaj babilado. Homoj venis iom post iom laŭ la pramsĝiphararoj. Aperis tri adoleskantoj el Vankuvero kiuj lernis Esperanton per Duolingo kiel sekretan lingvon kaj jam post jaro bone parolis. Ili venis kun siaj gepatroj kiuj ne parolas Esperanton, kio memorigis min pri mia unua NOREK kiam mia paĉjo venigis min al la kongresejo.

Ni ludis version de bingo en kiu oni devas plenigi la paĝon per la eltrovo de faktoj pri la aliaj ĉeestantoj. Kvankam iu en la grupo iam faris tofuon permane, ĉiuj scipovis naĝi do ni ne sukcesis plenigi ĉiun kvadraton. Bonvenon al la okcidenta marbordo.

La postan matenon (tro frue por tiuj kiuj babilis dum duono de la nokto), mi malfermis la kongreson per teritoria agnosko. Kvankam tio estas preskaŭ ĉiama afero en la kutima vivo ĉe ni, oni apenaŭ faras tion en Esperantujo; do ni decidis ŝanĝi tion ĉi-jare. Poste, okazis prelegoj pri diversaj temoj, de la laŝucida lingvo ĝis la suna eklipso en aŭgusto.

Posttagmeze, ni ekskursis al la provinca leĝodomo (kvankam ĝi bedaŭrinde estis fermita) kaj poste elektis inter vizito al la ĉina kvartalo aŭ la provinca muzeo. Mi vizitis la muzeon dank' al senpaga bileto de mia biblioteko, kio ankaŭ rajtigis min enlasi la tri junulojn. Ni lernis pri indiĝena historio kaj lingvoj kaj natura historio per interesaj filmetoj kaj ekspozicioj; estis tio iom pli vigla ol prelegoj por la junularo.



Vespere, ni picumis en la kongresejo kaj aŭskultis mojosan koncerton plenumatan de Alena, Nikvo kaj Simono. Dimanĉon post matena fermo, homoj umis en etaj grupoj. Kelkaj spektis pramsĉipan dancadon; mi manĝis, promenis en la urbo, vizitis parkon kaj finfine adiaŭis.

Mi multe lernis dum la kongreso, ĉefe pri kiel organizi esperantaĵojn. Mi multe fuŝis kaj hontas pri la fakto ke mi ne kontrolis la alireblon de la loko; venontfoje tio certe estos la plej grava konsidero. Mi eĉ pli klare komprenas la malfacilecon prizorgi kaj junulojn kaj maljunulojn samtempe. Kaj mi malfeliĉe konstatis ke eĉ en Esperantujo ekzistas rasismaj, seksismaj, klasismaj kaj koloniismaj tendencoj.



Malgraŭ tio, mi amuziĝis kaj jam antaŭĝojas la venontjaran Komunan Kongreson en Seatlo (la 13an-16an de julio) kiu anstataŭos NOREK-on. Mi kore dankas al KEA kiu donis al mi stipendion por ke mi povu ĉeesti la aranĝon.

Fotoj: Lottie Ericson





# ARE 2017 KAMILA

La Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE) okazis denove en Silver Bay, inter la 7a kaj la 9a de oktobro. Stranga afero: ĉi-foje mi petveturis sola, simple ĉar mi ŝategas tion kaj mi bezonis sperti denove tiun specialan senton de aventuro, post – laŭ mia sento – tro da tempo en mia hejma regiono. La vojo estis longa, sed mi estas iom obstina, kaj decidis tamen petveturi el Kebeko ĝis ARE en Silver Bay, trapasante Vermonton. Vere, la plano povus fiaskegi, sed finfine mi sukcese alvenis je la 2a matene en la komunuma dometo, kun la helpo de afabla viro kiu "ne vere volis reveni hejmen" kaj veturigis min.

Kompreneble, mi maltrafis la tutan sabaton, inkluzive mian propran proponitan agadon. La postan tagon, mi ankaŭ maltrafis aliajn agadojn, ĉar mi ne sufiĉe estas diligenta partoprenanto por vekigi frue. Tamen, dimanĉe, mi alvenis je la fino de la Oratora Horo kaj aŭdis kelkajn partoprenantojn



klarigi en 3 aŭ 5 minutoj diversajn temojn: prezento de interesa libro de la franca demografiisto Emmanuel Todd, kiel lavi vian hundon post ĝia renkontiĝo kun mefito, ktp. Ankaŭ dum la semajnfino, mi ĉeestis la prelegojn "Kiel oni povas ŝpari monon" (Steven Horvath) kaj "La lingva situacio en Kebekio" (Nicolas Viau).



Kiel oni povas ŝpari monon

La lingva situacio en Kebekio

Rilate al la Esperanta movado en Nordameriko, mi maltrafis (jes, ankaŭ tion!) la diskutrondon pri la UK 2020 en Montrealo. Tamen, mi partoprenis tiun pri la Tutmonda Esperanta Junulara Organizo (TEJO) kaj la junulara nordamerika movado ĝenerale. Francesco Maurelli, estrarano de TEJO, kaj Sara Spanò, el la Universala Esperanto-Asocio (UEA), klarigis la kialojn de la divido inter TEJO kaj UEA, kaj petis opiniojn pri la kresko de la junulara movado ĉi tie. Ĉar UK okazos en Montrealo, JEK (Junularo Esperantista Kanada) kaj USEJ (Usona Esperantista Junularo) pripensas okazigi IJK-on (Internacian Junularan Kongreson) en Bostono aŭ en Toronto. Francesco kaj Sara certigas ke TEJO pretas subteni nin laŭ niaj bezonoj, kaj prezentis planon de TEJO por efike respondi al nunaj defioj (ĉi-apude).

### **Junulara movado:**

- A-** Havi pli altkvalitan aleksteran komunikadon
- B-** Plibonigi la sciojn kaj organizajn kapablojn de la aktivuloj
- C-** Krei kunlaboron kun aliaj organizoj kaj sentebliigi pri lingva justeco

### **Organiza disvolviĝo:**


- D-** Krei sistemon por engaĝado en TEJO kaj pli forta ligo kun landaj sekcioj
- E-** Certigi daŭripovan financon strukturon en TEJO

Cetere, en julio okazos la usona landa kongreso en Seatlo, kaj USEJ kaj JEK proponas ke ĝi estu kiel la Nordamerika Kongreso. Krome, mi kuraĝigas vin varbi por JEK!



Dum la semajfino, Thomas Alexander menciis kelkfoje ke estas du ARE-oj – la unua en la hotelo, la dua en la dometo – kaj, depende de kie oni loĝas, oni ne vidas la samajn homojn kaj ŝajnas, ke tio kreas du grupojn tute apartajn. Evidente, en la dometo, la etoso estas tute alia ol en la hotelo, kaj ĉi-jare ankaŭ, ni ege amuziĝis. La komunumaj manĝaĵoj estis tre afablaj kaj abundaj; kiel kutime, ĉiuj aĉetis tro da manĝaĵo sed ni multe dividis kion ni kunportis. Dum vesperoj, homoj drinkis kaj ludis la ludojn “Catan” kaj “Kartoj Kontraŭ Esperantujo”.





Jen novaĵo: ni prenis du grupajn fotojn, tage kaj vespere! Por daŭrigi la demokratian tradicion, ĉiuj diskutis la bonajn kaj malbonajn punktojn de la semajnfino, kaj proponis ideojn kaj ŝanĝojn por la venonta jaro. Interalie, la bazaj lecionoj por novuloj sukcesis kaj daŭros venontan jaron. Tiel, oni povos venigi amikojn kaj familianojn por igi ilin esperantistoj! La programo kaj la kultura vespero estis tamen malsukcesaj, ĉar ĉiuj aliĝis tro malfrue kaj forgesis prepari ion por prezenti dum la kultura vespero, kiu estis iom mankohava. Nu, venontan jaron, ni devas aliĝi pli frue! Praktiku viajn kantojn por la esperanta karaokeo!

Ni forlasis ARE-on dirante "ĝis revido", kaj mi ankoraŭ havas la ŝnureton de Parker Glynn-Adey sur mia pojno, por formi la "ponton" kaj la "stelon" kun ĝi.

## La Alfabetoj Interrilataj | Yury Jakimec

**K**iam oni lernas novan lingvon, ofte oni bezonas lerni alian skribsistemon por skribi aŭ legi ĝin. Kaj ofte, la nova skribsistemo estas malsama de la sistemo kiun oni jam uzis. Sed eble tiuj sistemoj estas rilataj. Unu el miaj preferataj retpaĝoj por serĉi informojn pri lingvoj kaj skribsistemoj estas [proel.org](http://proel.org). En tiu paĝo oni povas vidi kiel la alfabetoj estas rilataj.

La historio komenciĝis kun la egipta skribsistemo. Ĝi estis sistemo kun ideogramoj. Sed la egiptoj kontaktis aliajn popolojn tra negocoj kaj povo. Unu el ili, la fenicoj, prenis kelkajn ideogramojn, kaj anstataŭ uzi ilin por prezenti vortojn, uzis ilin por reprezenti sonojn. Jen la unua alfabeto. La fenicoj estis negocistoj kaj vojaĝis al multaj lokoj. Aliaj landoj en kontakto kun ili ankaŭ lernis kiel skribi. Pro kelkaj motivoj, kelkaj alfabetoj iĝis pli uzataj ol aliaj, kaj influis iujn lingvojn. Inter ili, ni povas mencii

la latinan kaj la cirilan skribsistemojn, kiuj hodiaŭ estas tre uzataj.

En ĉi tiu artikolo, mi prezentos la rilatojn inter 4 alfabetoj, sed ni komencos per la fenicia kaj speciale ni prezentos la latinan alfabeton. En la interreto, se vi deziras ekscii pli pri la temo, ekzistas pli da informoj disponeblaj kaj kun bonaj eksplikoj kaj studoj. Vikipedio havas kelkajn artikolojn pri tiu temo kun multaj referencoj por plu serĉi. Oftas referencoj al "the Oxford English Dictionary 2nd edition", kaj "the Merriam-Webster's 3rd New International Dictionary of the English Language". La personoj kiuj scipovas la hispanan povas legi la retpaĝon [proel.org](http://proel.org). Tiuj kiuj scipovas la anglan povas ankaŭ legi [omniglot.com/writing/phoenician](http://omniglot.com/writing/phoenician) kie vi povas vidi la originalan fenician alfabeton, kaj de kie mi prenis la nomojn kaj la signifojn de la literoj.



La unua litero estas *Alef*. Ĝi signifas "Bovon" en la plimulto de la semidaj lingvoj. La originala simbolo evoluis en fonetikan literon kiu estis sen sono, sed reprezentis malsamajn vokalojn. El la evoluo de tiu litero alvenis la unua litero de la alfabeto: **A**. En la greka, ni havas la literon "*Alfa*" ("**α**").



La dua litero kiu havas tian simbolon estas *Bet*. Ĝi signifas "Domon" kaj ĝi havas la sonon "bo". La litero "**B**" devenas de la litero *Bet*. En la greka, ni havas la ekvivalentan literon "*Beta*" ("**β**"). En la cirila ni havas la literojn "**Б**" kaj "**В**" kun iliaj sonoj "bo" kaj "vo".



*Gamal*: Ĝi signifas "Kamelon". Kelkaj literoj "**G**" originas de la litero *Gamal*, kiel la greka litero "*Gamma*" ("**Γ**", "**Υ**") kaj la cirila "**Г**". Paroli pri la latina alfabeto ne estas facile. La lokon de tiu litero en la alfabeto havas la litero "**C**", kiu havas malsaman sonon. Ekzistas teorioj kiuj diras ke la literoj "**C**"

kaj "**G**" havas la saman originon. Mi mem kredas ke la rilato inter ili ne venas de la litero *Gamal*.



La kvara litero estas *Dalet*. Ĝi signifas "Pordon". Ĝi reprezentas la sonon "do". El tiu litero devenas la litero "**D**". Estas interese vidi la similecon kun la literoj "*Delta*" ("**Δ**") en la greka alfabeto kaj la "**Д**" en la cirila.



"*He*" estas la kvina litero. Kelkaj personoj tradukas tiun vorton kiel "Fenestron". Sed la nomo "he" povus veni el esprimo de emocioj reprezentata per la maldekstra simbolo. La literoj kun la sono "e" kiel la "E", kiel la greka "*Epsilon*" ("**ε**"), kaj la malsamaj versioj de tiu litero en la cirila ("**Е**", "**Ё**", "**Э**"), havas originojn en "*He*".




*Ŭaŭ* estas la sesa litero. Ĝi estas tradukita kiel "hoko", sed ankaŭ kiel "Najlo". De ĝi originis ĉefe literoj kiel U, V, W, Y. En la fenicia lingvo, tiu litero reprezentis sonojn kiel "u" kaj "ŭ".

Aliaj semidaj lingvoj uzas Ŭaŭ-on por reprezenti ankaŭ sonojn kiel "o" kaj "vo". Tiaj literoj evoluis al la greka litero "Upsilon" ("Υ", "υ") de kiu originis sonoj kiel "u" kaj kiel "vo" en diftongoj. De tiu litero originis la "V" en la latina kiu ankaŭ estis uzata kiel "u" kaj "v". Poste, tiuj sonoj apartiĝis kaj poste aperis la litero "W". La latina litero "Y" venis en posta evoluo el la greka alfabeto. En la cirila ni havas la literon "Y" kun la sono "u". Ekzistas ankaŭ teorioj kiuj ligas la latinan literon "F" kun la litero Ŭaŭ, kaj tial ni povus klarigi ĝian formon kaj ordon en la alfabeto. Mi mem kredas ke la litero "F" estas pli rilata kun la litero "P".

## I

La sepa litero estas *Zajin*: Zajin signifas "Glavon". La literoj kun la sono "zo" venas el tiu litero. Jen ni havas literojn kiel la greka "Zeta" ("Ζ", "ζ"), la latina "Z" kaj la cirila "З".



*Het*. Ofte ĝi estas tradukita kiel "Muro" sed kelkaj erudiciuloj parolas pri la uzo de "Fosto" por subteni tendojn. Kvankam ĝia sono estas [ħ] ĝi evoluis en la literon "H". De tia litero ankaŭ venis la greka litero "Eta" ("Η", "η") kaj la cirila "И". Estas interesa afero vidi ke la cirila "H", kvankam ĝi havas similan formon, ne originas de tiuj literoj.



*Tet*. Ofte ĝi estas tradukita kiel "rado", "aĵo", aŭ "nodo". Literoj kiuj havas la anglan sonon "th" venas de tiu ĉi litero. Ekzemple ni havas la grekan literon "Theta" ("Θ"). Inter la latinaj literoj ni havas "Ð" kaj "ð" kiuj ankoraŭ ekzistas en kelkaj lingvoj kaj ankaŭ ekzistis en la angla. En la cirila ni havas ("Ө") kiu ne estas plu uzata.



*Yod:* Ĝi signifas "Manon". La litero "i" kaj la rilataj sonoj venas de tiu litero. Jen ni havas la grekan literon "Iota" ("Ι"), la latinan literon "I", kiu poste formis la literon "J" por apartigi la vokalan sonon, kaj la cirilajn literojn "И" kaj "Й".



*Kaf:* Ĝi signifas "Manplaton". La litero "K" originas de tiu litero. Ni povas diri ke ankaŭ la greka litero "Kappa" ("κ") estas en tiu grupo. Ekzistas ankaŭ la ebleco, ke tiu ĉi litero ankaŭ influis aliajn kiel "X" kaj "C", tiel ke hodiaŭ ili havas similajn sonojn, kiuj inkludas la sonon "kh" (kiel la litero Ĥ en Esperanto).



*Lamed:* Ĝi signifas "bastonon". La litero "L" originas de tiu litero. Aliaj literoj kun similaj sonoj, kiel la greka "Lambda" ("Λ", "λ") kaj la cirila "Л", estas en tiu grupo.



*Mem:* Ĝi signifas "Akvon". La litero "M" originis de tiu litero. La greka litero "Mu" ("μ") estas ankaŭ en tiu grupo.



*Nun:* Ĝi signifas "Serpenton". La litero "N" devenas de la Nun. Ankaŭ aliaj literoj kun "no" sonoj venas de tiu ĉi litero, kiel la greka "Nu" ("ν") kaj la cirila "Н". Kvankam ĝi havas similan formon kiel la litero "H", ili ne estas rilataj.



*Sameh:* Ĝi signifas "Fiŝon". Ĝi havas la sonon "so". De tiu litero originas aliaj kun la sono "x" [ks], kiel la greka litero "Xi" ("Ξ", "ξ") kaj la cirila litero "Ѓ", kvankam en la cirila ĝi ne estas plu uzata. En la latina alfabeto, neniu litero originas de tiu ĉi litero.



○

*Ajin:* En la plimulto de la semidaj lingvoj, tiu vorto signifas "Okulon". Ĝi reprezentas guturalan sonon kiu ekzistas en preskaŭ ĉiuj el la semidaj lingvoj, sed ne ekzistas en la hindeŭropaj lingvoj. En la greka, tiu litero estis adaptita kun la nomo "Omikron" kun la sono "O". En la latina kaj la cirila ĝi reprezentas la literon "O". Estas interese reliefigi, ke en la greka lingvo kaj en multaj latinaj kaj slavaj lingvoj, la vorto por "Okulo" komenciĝas per la litero "O" [hispana "ojo"; itala "occhio"; latina "oculus"; portugala "olho"; rumana "ochi"; franca "œil"; greka "οφθαλμός"; bulgara "oko"; kroata "oko"; ĉeĥa "oko"; pola "oko"; rusa "oko"; serba "oko"; slovaka "očné"; slovena "očī"; ukraina "oko"].

⤿

*Pe:* Ĝi signifas "Buŝon". Kelkaj literoj kun la sono "p" havas originon ĉi tie, kiel la greka "Pi" ("Π", "π") kaj la cirila "П". La latina litero "P", kvankam ĝi estas pli simila al la litero

"Reŝ" kiun ni poste traktos, ankaŭ venas de la fenicia litero "Pe". Ekzistas teorioj kiuj diras ke la greka "Pi" pasis al la etruska alfabeto, kiu finfine skribis ĝin alimaniere. Kaj la latina litero "P" venis de la etruska.

⤿

*Cade:* Ĝi signifas "papiruson". Ĝi povas signifi ankaŭ "Alon". Ĝi havas la sonon "co". Nenio indikas ke tiu litero helpis krei iun literon en la alfabetoj kiujn ni nun studas.

⤿

*Kof:* Ĝi signifas "Okulon de nadlo". En la moderna hebrea ĝi signifas "Simion". Ĝi havas guturalan sonon kiel Q. La latina litero "Q" venas el tiu litero. En la malnova greka ekzistis litero konata kiel "Kopa" ("Ϟ") kiu ne estas uzata en la moderna greka.

# Ĝ

*Reŝ:* Ĝi signifas "Kapon". De ĝi originas la litero "R", en la greka la litero "Ro" ("ρ") kaj en la cirila la litero "P". Ĝi estas tre simila al la latina litero "P".

# Ŝ

*Ŝin:* Ĝi signifas "Denton". Literoj kiuj reprezentas la sonojn "so" aŭ "ŝo" venas el tiu litero. La literoj kiuj originis de ĝi estas la greka "Sigma" ("Σ"), la cirila "Ш" kaj la latina "S".

# Ĝ

*Taŭ:* Ĝi estas "Signo". De tiu litero originis la greka kaj latina literoj "T", kvankam ni uzas ankaŭ "X"-on por signi ion.

La hebrea lingvo, kvankam ĝiaj literoj ne estas samaj, finfine uzas la saman alfabeton kiel la fenicia aŭ la aramea, kun la sama ordo kaj la samaj nomoj por ĝiaj literoj. La jenaj literoj en la hebrea havas duoblan sonon: "ב", "כ", "פ", "ש", "ת".

Estas tre interese vidi kiel tiuj literoj similas al iuj latinaj literoj:

"ב" por "b" kaj "ב" por "v".

"כ" por "k", "כ" por "kh" ("ĥ") – en aliaj lingvoj "c" kaj "ch".

"פ" por "p", "פ" por "ph".

"ש" por "sh" ("ŝ"), "ש" por "s".

"ת" por "t" kaj "th". La sono "th" [θ] ne estas uzata en la moderna hebrea.

Eltirita de la [blog](#) de Yury Jakymec.

Plibonigita Esperanto-versio fare de Lumo.

Pri faktoj kaj opinioj sole respondecas la aŭtoro.

# Danci la vivon! – Tamara-Ne-Amara

«Ĉu vi volas danci en granda rondo,  
inter homoj de la tuta mondo...?!»

JoMo, Francio

Danci la vivon!

Tia estas la simpla invito de Biodanza (Biodanco). Ĝi celas plibonigon de nia sano tra la konekto al niaj vivinstinktoj kaj tra la stimulado de la vivĝojo. Ĝia kreinto, Rolando Toro Araneda, estis ĉilia antropologo kiu laboris kun grupoj da homoj en mensa malsanulejo. Tie li povis konstati kiomgrade la muziko kaj movo influas nian ĝeneralan staton kaj bonfarton. Biodanza rapide eliris el tiu fermita medio. Lia sistemo estas pedagogio de homa kresko kaj evoluigo bazita sur la muziko, spontana movo kaj grupa energio kie homoj proponas al si reciproke varman akceptoplenan bonvenigon. Tiu pliriĉigita medio permesas sperti liberecon kiu nutras vivenergion kaj permesas spontan, ĝojoplenan sinplenumon.

Ekde la okdekaj jaroj, Biodanza disvastiĝas tra la mondo kaj nuntempe estas jam konata en multaj landoj. Oni povas fari la dancantan rondon en Svislando, Francio, Italio kaj ankaŭ en Argentino kaj Japanio! Kion mi strebas per tiu ĉi artikoleto estas informi legantojn de *Lumo* kaj vekti iliaparte intereson al tiu sufiĉe nova socia fenomeno kiu alportas multe da ĝojo kaj plezuro al partoprenantoj. Sed krome, kion mi celas estas krei konekton inter la Esperanta medio kaj la komunumo de Biodanculoj, ĉar mi firme kredas ke ili povas multe pliriĉigi sin reciproke.

Esperantujo celas ja komunan homaranan senton tra la komuna lingvo mondscale, kaj Biodanza celas helpi nin plene eksenti nian apartenon al la homa specio laŭ plena esprimo de nia biologia potenco, kaj pacan kunekziston kun la aliaj specioj de la Tero.

Kun Dorotea Pok ([facebook.com/doroteapok](https://facebook.com/doroteapok)), kiu estas longdaŭra instruistino de Biodanza, mi intencas proponi dumkongrese komunan dancadon laŭ tiu bela kaj sentema maniero. Venu danci la vivon kun ni!

Intertempe informiĝu ĉu en via loka komunumo vi jam povas sperti Biodancon.



Vi povas daŭrigi la legadon pri Biodanza laŭ ĉi-subaj ligoj:

[biodanza.ca/](http://biodanza.ca/)

[facebook.com/Biodanza-Toronto](https://facebook.com/Biodanza-Toronto)

[biodanza.org/international-biocentric-foundation](http://biodanza.org/international-biocentric-foundation)


Tamara Anna Koziej estas poldevena esperantistino kiu loĝas en Saguenay, Kebekio. Ŝi interesiĝas pri naturo, arto kaj ĝardenoj. De ĉi jaro ŝi vizitadas novkreitan lernejon en Kebekurbo (por iĝi en 2020 memstara faciligantino de Biodanza).

# Skizaj memoroj pri Marjorie Boulton verkitaj la tagon post ŝia forpaso, 31-08-2017

Geoffrey Greatrex


**M**i ankoraŭ memoras la unuan fojon, kiam mi renkontis Marjorie-on: kun ŝia fidela helpanto kaj longdaŭra amikino, Kate Hall, ŝi deĵoris ĉe la budo de ODES (Oxford and District Esperanto Society) en la grandskala flavbekula foiro en la ekzamenejo de la universitato Oksfordo. Mi rondiris la centojn da budoj, neniel atendente, ke mi tie trovu Esperanto-budon, nek budon, kie deĵoras ne aliaj gestudentoj, sed anstataŭe emeritulinoj. Samtempe, kiam mi ekparolis al ili en Esperanto – kiun mi lernis nur dum la antaŭa jaro – ankaŭ ili surpriziĝis. Estiĝis de tiam firma amikeco, kiu daŭris ĝis ŝia morto; malgraŭ preskaŭ dudekjara restado nun en Kanado, mi ĉiam vizitis ŝin almenaŭ dufoje jare, ĉar mi regule vizitas Brition kaj Oksfordon.

Aliaj povos trakti pli precize la kronologiajn konturojn de ŝia vivo kaj kariero. Estos pli utile ĉi tie elvoki ere aspektojn de ŝia karaktero, principe per anekdotoj, kiujn ŝi mem rakontis al mi. Ĉiam Marjorie estis sentema, empatiema homo, ekde la plej juna aĝo: ŝi rakontis, ekzemple, pri ŝia infaneco en kampara Lincolnshire (en orienta Anglio), kie ŝia patro estis lernejestro en vilaĝo. Tie ŝi multe interesiĝis pri la bestoj kaj la naturo, kiuj ŝin ĉirkaŭis. Dum la dua mondmilito necesis konstrui en la ĝardeno ŝirmejon kontraŭ aviadilaj bomboj; tie kaŭris la familio kiam sonis la alarmo. Se mi bone memoras, ŝi rakontis pri tio, ke iam, kiam ŝia patro riskis forlasi la ŝirmejon por serĉi ion en la domo – laŭ mia memoro, ion tute banalan, kiun li finfine ne povis trovi – Marjorie kaj ŝia patrino tre timis pro lia foriro. Ĉiuj tamen feliĉiĝis kiam li revenis kaj mokis lin pro lia nekapablo trovi la aĵon.




Pro helpo kaj kuraĝigo de loka instruisto (kaj evidente siaj gepatroj) Marjorie sukcesis eniri la universitaton Oksfordo, kiu, tiuepoke, akceptis malmultajn studentinojn; ĉiuj devis aliĝi al manpleno da kolegioj, kie studis nur virinoj. En la kazo de Marjorie, temis pri la kolegio Somerville, kien ŝi poste revenis por doktoriĝi en la 70aj jaroj. En preskaŭ ĉiuj ceteraj kolegioj, aliflanke, studis nur viroj. La universitata sperto ŝanĝis ŝian vivon, larĝigis ŝiajn horizontojn kaj ebligis al ŝi kontakton kun granda varieco da homoj, inter ili la bone konata verkistino Iris Murdoch, kiu restis konstanta fidela amiko ŝia. Ĉe la festo por sia 90a datreveno, Marjorie rakontis pri la kolegia vivo tiutempe, dum la milito, kaj pri kelkaj aventuroj siaj; en la nokto, ekzemple, ŝi devis foje gvati surtegmente por estingi fajron, okaze ke bomboj falos sur la kolegion. (Samtempe samon faris en Kembriĝo John Maynard Keynes, la ekonomikisto). Ŝiajn rakontojn espereble iam eblos aŭskulti kaj vidi en filmo de la festo en Somerville-kolegio (de Franĉjo Veuthey).

Post la diplomiĝo la vivo de Marjorie ne estis facila. Ŝi dum ioma tempo instruis en kolegio apud la landlimo inter Anglio kaj Skotlando, sed poste fariĝis estro de kolegio por instruistoj en Cumbria, nord-okcidenta Anglio. Tie konspiris kontraŭ ŝi kelkaj kolegoj, tiel ke oni devigis ŝin ekŝiĝi de sia posteno. Sed je tiu momento helpis ŝin la estro de la universitato Lancaster, kiu tuj proponis al ŝi postenon anstataŭe, tiel montrante sian fidon al ŝi. Plurfoje ŝi rakontis pri la epizodo. Tre ĉagrenis ŝin la perfido de ŝiaj kolegoj, sed despli kortuŝis ŝin la tuja lojaleco kaj fido de la estro, Charles Carter.



Post tiu malgaja epizodo, ŝi dum ioma tempo loĝis apud sia patrino kaj onklinoj en Stoke-on-Trent; samtempe floris ŝia Esperanto-vivo. Ofte ŝi rakontis pri siaj rilatoj kun la onklinoj, kiuj loĝis triope. Unu inter la tri suferis mokadon de la aliaj du pro sia intereso pri kulturo kaj literaturo. Marjorie, kiu evidente sentis tion kaj kompatis ŝin, ne hezitis inviti ŝin kunvojaĝi kun si plurfoje, inkluzive dum krozado en la Mediteraneo. Ili kune vizitis Romon, Hispanion, Kartagon (en Tunizio) inter aliaj lokoj. Ŝi kortuŝe priskribis kiel ekploris ŝia onklino, kiu, vidante la restaĵojn de la romia urbo en Kartago, apenaŭ kredis, ke ŝi vidas la urbon, kiun iam detruis Skipiono antaŭ tiom da jarcentoj. Laŭ Marjorie, la du ankaŭ hazarde renkontis la papon dum vizito al Vatikano, kiam ili iom perдите laŭiris koridorojn tie; malgraŭ la firma protestanteco de ŝia onklino, ŝi tamen akceptis lian benon. Pri fido kaj religio Marjorie mem certe kredis je iu divina estaĵo, sen tamen aliĝi al unu aparta religio.

En tiu sama periodo Marjorie vizitis Pollandon, kie ŝi famiĝis pro du detektivromanoj, kiujn ŝi verkis anglalingve, sed, post traduko en la polan, furoris en la tiutempa komunista lando. Ŝi invitis sian patrinon akompani ŝin tra la lando, kvankam ŝi parolis nek Esperanton, nek la polan. La patrino multe dependis de sia filino, eĉ akompanante ŝin al radio-studioj, kie oni intervjuis Marjorie-on pri ŝiaj verkoj. Sed ŝi ne hezitis doni patrinajn konsilojn al sia filino en restoracio, insistante, ke Marjorie ne manĝu nekutimaĵojn: ŝi rekomendis nur la plej simplajn pladojn. Malgraŭ la rekomendo, Marjorie elektis tre spican pladon – al ŝi cetere tre plaĉis kareoj kaj multaj ekzotikaj manĝaĵoj – dum la patrino preferis simplan manĝaĵon. La sekvan tagon, tamen, estis la patrino, kiu malsaniĝis pro la manĝaĵoj...



En la 70aj jaroj Marjorie revenis al Oksfordo, kie ŝi pasigis la ceteron de sia vivo. En sian hejmon, en kiu ŝi konstruigis Esperanto-studoĉambron, ŝi bonvenigis arojn da esperantistoj, ĉu mondfamaj eminentuloj, ĉu junaj vizitantoj, ĉu lokaj anoj de la asocio. Neniam mankis belaj manĝaĵoj; nur poste en ŝia vivo mankis katoj. Ŝi verve organizis britan kongreson en la urbo en majo 1990, kiun mi bone memoras, ĉar ĝuste tiam okazis miaj finaj ekzamenoj. Ŝi fidele kaj konstante laboris por Esperanto ne nur per siaj literaturaĵoj sed ankaŭ per konkretaj agoj por helpi samideanojn ĉie en la mondo; pluraj rakontis anekdotojn pri ŝiaj bonfaroj dum sesioj en Lille en julio 2015, la lastan fojon kiam ŝi ĉeestis grandan Esperanto-eventon. Multaj memoros la donacetojn, kiujn ŝi sendis grandskale antaŭ Kristnasko, ekz. globkrajonojn, monujojn, krajonojn, paĝindikilojn, ĉiam ornamitajn per bela esperantlingva slogano.

Marjorie estis ĝisosta samideano. Mi kredas, ke mi neniam renkontis iun, kiu tiagrade kapablis konsenti (ne nur konsenti) kun aliaj, kiu ĉiam strebis vidi la starpunkton de la alia persono. Evidente ŝiaj verkoj spegulas tiun empatian. Sed ŝi samtempe estis sprita homo, al kiu plaĉis vortludoj, ŝercoj – ĉu decaj, ĉu ne – kaj kiun animis rimarkinda scivolemo; preskaŭ ĉiujn tiujn trajtojn oni povas observi en ŝia populara lernolibro, *Faktoj kaj Fantazioj*. En siaj lastaj jaroj, la cerbo de Marjorie daŭre bone funkciis, eĉ se la memoro pli kaj pli lamis. Ŝi devis lukti kontraŭ pluraj malsanoj, sed malofte plendis.



Ŝi restis en regula kontakto kun geamikoj ĉirkaŭ la mondo; indas en ĉi tiu kunteksto reliefigi la helpon de Maciej Mirnowicz, la pola flegisto, kiu prizorgis ŝin dum la lastaj jaroj kaj akompanis ŝin al Lille. Li ne nur vartis ŝin, sed ankaŭ okupiĝis pri lokaj katoj, zorgis pri la ĝardeno, kaj eĉ (kio multe amuzis Marjorie-on) fortimigis rabiston, kiu volis enŝteliĝi en la domon; kiel Marjorie ride klarigis, li estas ne nur flegisto sed ankaŭ antaŭa boksa ĉampiono. Pli lastatempe li helpis komunikadon inter Marjorie kaj ŝiaj amikoj per la reto.

Amasiĝos nekrologoj pri Marjorie dum la venontaj monatoj kaj jaroj. Oni povas esperi, ke iu eĉ verkos biografion, kiel ŝi certe meritas, iama biografo de Zamenhof. Ĉi tie mi nur celis skize iomete lumigi la vivon kaj karakteron de eksterordinara esperantisto kaj homarano.



# DIVERSAĴOJ

REKLAMO REKLAMO REKLAMO

Louis FRÉCHETTE

## Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado



Kun la originalaj ilustraĵoj de  
Frederick Simpson COBURN

ESPERANTO-SOCIETO KEBEKIA

## Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado

Ses kristnaskaj rakontoj de [Louis Fréchette](#) [lui freŝet] (1839–1908), unu el la gravaj franckanadaj verkistoj de la 19a jarcento. 130 paĝoj, kun nigraj-blankaj ilustraĵoj de la kanada pentristo [Frederick Simpson Coburn](#) (1871–1960). Publikigis tiun esperantlingvan eldonon **Esperanto-Societo Kebekia** en 2013.

« [...] la beleco, la facileco de la lingvaĵo, la sincera homamo, kiu elradias el la noveloj, faras el la libro de Fréchette idealan donacon – ne nur kristnaskan – al ĉiunivelaj esperantistoj. »

– Eugene de Zilah, La Gazeto, novembro 2014

« Aventuro, pioniroj, neĝoŝtormoj, glaĉeroj, riveroj, situacioj en kiuj la naturo estas malamika kaj malgastama: jen la ĉefaj ingrediencoj de la ses rakontoj, ĉiuj tre ĝuindaj kaj engaĝaj. »

– Sara Spanò, Literatura Foiro, aŭgusto 2015

Aĉetu paperan aŭ elektronikan eldonon alklakante [ĉi tie](#).  
Papera eldono 23 CAD (kanadaj dolaroj) plus sendokostoj,  
elektronika eldono 14 CAD.

# REKLAMOJ DE LA KASTELO GREZILJONO

La sekva programo de Kastelo Greziljono: [gresillon.org/agendo](http://gresillon.org/agendo)

- 2018-apr-20/28: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kaj internaciaj KER-ekzamenoj: [gresillon.org/p](http://gresillon.org/p)
- 2018-maj-09/13: Korusa renkonto de Interkant' kaj Renkontiĝo Vegana: [gresillon.org/oruso](http://gresillon.org/oruso)
- 2018-jul-09/27: Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj
- 2018-jul-09/16: Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso: [gresillon.org/s1](http://gresillon.org/s1)
- 2018-jul-16/21: Turisma semajno kaj Esperanto-kurso: [gresillon.org/s2](http://gresillon.org/s2)
- 2018-jul-21/27: Internacia E-Konferenco de OSIEK « Esperanto en Artoj »: [gresillon.org/s3](http://gresillon.org/s3)
- 2018-aŭg-11/19: Festa Semajno por infanoj kaj familioj, [gresillon.org/s4](http://gresillon.org/s4)
- 2018-maj-09/13: ReVe, Renkontiĝo Vegana: [gresillon.org/reve](http://gresillon.org/reve)

Kara samideanino, kara samideano

Ekde sesdek kvin jaroj, nia franca Esperanto-Kulturdomo posedas Kastelon Grésillon por progresigi Esperanton per kursoj kaj aliaj esperantlingvaj renkontoj. Por konservi la ejon kaj adapti ĝin al la postuloj de nia epoko, necesas bontenaj laboroj: pluraj jam efektiviĝis, pluraj estas planataj. La Kulturdomo Greziljono nuntempe povas aŭtonome certigi parton de tiuj konstruejoj, sed povas malfacile lanĉi ĉiujn necesajn laborojn.

Inter la prioritatoj, ni devas al rulseĝaj personoj kun moveco reduktita (PMR) oferti unu aŭ du adaptitajn dormĉambrojn kaj lavejojn. Tiel nin devigas la leĝoj, sed ankaŭ nia zorgo digne akcepti ĉiujn niajn gastojn sen diskriminacio. Pluraj ebloj estas konsiderataj kaj la elektita projekto estos realigita tuj kiam ni havos la necesajn financojn. La leĝa limdato de la laŭnormigo estas la 31a de decembro 2018.

Por akceli la aferojn, ni lanĉas ĉi tiun **alvokon al donacoj**. Se vi rekonas la gravecon realigi plej rapide tiujn laborojn, kaj se vi pretas subteni nin, bonvolu sendi vian donacon al: **Maison Culturelle de l'Espéranto, Château de Grésillon, Saint-Martin-d'Arcé, 49150 Baugé-en-Anjou, France** aŭ per iu el la pagomanieroj menciitaj en [nia retejo](#), precizigante pagocelon "donaco PMR".

Vi povas ankaŭ subteni, akirante societajn partojn B (laŭ la statutoj) kaj partoprenante en niaj agadoj, inkluzive en la laboroj de la volontulaj teamoj.

Pli da informoj, i.a. la teĥnika dosiero kaj la kostokalkulo, estos afiŝitaj poste. Ne hezitu nin kontakti per retpoŝto ĉe [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org). Kiu ajn estos la helpo, kiun vi alportos, la Esperanto-Kulturdomo dankas vin varme.



# INFORMLETERO DE VINILKOSMO

Saluton kara muzikŝatanto!

Jen [ligilo](#) al la nova 42a Informletero por informi vin pri la plej lastaj novaĵoj okazintaj ĉe VINILKOSMO kaj fari retrospektivon pri la gravaj muzikokazaĵoj de 2017.

Dum 2017 ni faris plibonigojn de nia platformo por pli facila uzado kaj akiro de Esperanto-muziko.


Sekve ni prezentos retrospektive la novajn eldonojn de la jaro 2017, kun la bitformaj reeldonoj de la unuaj kompiloj; tio estas la vinila kompiloto **Amplifiki/La Rozmariaj Beboj**, kaj **Vinilkosmo-Kompil' Vol.1 & Vol.2**, sed ankaŭ eldono de novaj albumoj de **Vojaĝo** kaj **Krio de Morto** kaj distribuado de la novaj albumoj de **Jonny M** kaj **i.d.c.**

Ni donas ankaŭ novaĵojn pri la **ABONKLUBO** kaj la justa elsendfluejo **1D tuŝ**, kaj fine ni parolos pri la eldonprojektoj de 2018.

2017 finfine estis relative aktiva kun belaj muzikproduktoj kiuj, ni esperas, donos al vi ideojn por ekprepari viajn donacojn por la festoj de decembro. Ni jam anticipe bondeziras al vi por la jarfinfestoj.

Dankegon pro via interesiĝo kaj subteno al la muzika agado de Vinilkosmo. Plej muzikajn bondezirojn de la tuta Vinilkosmo-teamo.

Malkovru la novan platformon kaj daŭre legu sur la retejo de [Vinilkosmo](#).



**Dekstren:**

- 2. Malvarmegas
- 4. Influenco
- 7. Kion oni diras kiam  
malvarmegas (2 vortoj)
- 10. Ursoj emas \_\_ en vintro

- 12. Malmola akvo
- 13. Varma hararo
- 14. Nordaj kaj sudaj zonoj
- 15. Ferio en decembro
- 16. Decembro 21, 2017
- 17. Varma mantelo

**Malsupren:**

- 1. Malsano kiu havigas  
nazmukon kaj tuson
- 3. Flugi suden antaŭ vintro
- 5. \_\_ sur manoj

- 6. Blanka \_\_ falas
- 8. Varma ortangul'
- 9. Eminentulo
- 11. 1° estas \_\_

Nu. Ĉi tie finiĝas la revuo.  
Komentu ĝin, skribu al ni, sendu kontribuaĵojn,  
kaj atendu la venontan numeron de Lumo!

**Redaktorino:** Kamila Koziej Lévesque

**Enketisto:** Geoffrey Greatrex

**Provlegantoj:** Bob Williamson, Geoffrey Greatrex, Francisko Lorrain

**Kompostado:** Kamila Koziej Lévesque

**Kontribuantoj:** Wally DuTemple, jet Meltzer, Bob Williamson, Ardeo Mann, Kamila Koziej Lévesque, Yury Jakymec, Tamara-Ne-Amara, Geoffrey Greatrex, Trevor Brown